ANNO 87 NUMERO 4 LUGLIO/AGOSTO 2010

L'esperanto

Revuo de Itala Esperanto-Federacio

Rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p.2)
Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero

Kelkaj komentoj pri Linjano
Fabio Bettani
pagina 3

Tanto sole e cultura a Lignano
Aldo Grassini
pagina 5

Torino 2011
Fabrizio A. Pennacchietti
pagina 6

EsperantoItalia.it
Daniele Binaghi
pagina 8

Raporto pri vojaĝo al Rusio
Paola Tosato
pagina 10

Historio de E-Muziko (2)
Floréal Martorell
pagina 12

Latinum est. Non legitur
Renato Corsetti
pagina 15

Nova Sento
Manuela Ronco
pagina 21

Federazione Esperantista Italiana

ISSN 1974-9147
9 771974 914006 01004

Poste Italiane S.p.A. - Spedizione in abbonamento postale 45%, D.L. 353/2003 (conv. in L. 27/02/2004 n.46) art.1, comma 1, DCB ROMA

ENKONDUKO

Jen malfrua numero de la revuo, pro teknikaj kialoj, pri kiuj mi pardonpetas, sed kompense, vi baldaŭ ricevos la venontan numeron, kiu estas la monografia.
Pro la malfruo, tamen, vi ekscios pri tio kio okazis en Lignano Sabbiadoro. Fakte, kiel vi rimarkos, grandparte, ĉi tiu numero estas dediĉita al la Nacia Kongreso. Ŝajnas ke ĉi jaron okazis la reviviĝon de nia cêfa kunveno. Ĝusta loko, bunta programo kaj kultura kaj spektakla kontribuis alvenigi multegajn homojn (certe kompare kun la lastaj), kaj pli pozitiva estis la fakto ke plejparte la partoprenantoj estis eksterlandanoj: do, certe pli Internacia, ol Itala. Kaj krom tio oni aldonu, ke oni jam fiksis la lokon de la venontjara Kongreso, kiu okazos en Torino. Certe ne mara urbo, sed se la nivelo de la programo similos al ĉi-jara, la rezultoj ne povos multe diferenci. Do, samideanoj, se ĝis nun vi nur legis pri kongresoj en la revuo, alvenis horo rekte partopreni: ne ĉiam okazas havi tiom multe da Esperantaj artistoj ne vojaĝante por miloj da kilometroj, kaj havi eblon ekkoni tiel buntnacian paradon da samideanoj.
Nu, krom pri la kongreso vi povas legi la kutimajn artikolojn, kiuj fariĝis preskaŭ deviga rendevuo, kaj la kutimajn rubrikojn. Espereble, do, interesa legaĵo por nia somerfino, atendante la alveno de la venontaj ferioj por denove ekvojaĝi al Esperantaj kunvenoj.

Pier Luigi Cinquantini

Direttore Responsabile e Redattore
Leĝe Respondeca Direktoro kaj Redaktoro:
Pier Luigi CINQUANTINI
via Dante Alighieri, 2, I-01010 Blera
tel.0761 479 503 - revuo@esperanto.it
*****
Amministrazione – Administrejo:
FEI – Via Villoresi, 38 – I 20143 Milano
tel/fax 02 5810 0857 – fei@esperanto.it
http://www.esperanto.it
C.F.80095770014
*****
C. C. Postali – PoŝtKontoj:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT94O0760101600000037312204
C. C. postale FEI libri (per l'acquisto di libri): n.54614524
IBAN: IT11K0760101600000054614524
*****
C. C. Bancario – Bankkonto:
Banca Intesa - S.Paolo, Ag.002 Milano
IBAN: IT06A0306909446000003625562 - BIC:BCITITMM432
Conto UEA – UEA-Konto: iefa-p
*****
Comitato Esecutivo FEI - IEF-Plenuma Komitato:
Renato CORSETTI, presidente
Aldo GRASSINI, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario generale
Riccardo PINORI, cassiere
Ranieri CLERICI
Pino LALLI
Brunetto CASINI
*****
Pubblicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2010 (comprensive di € 10 dell'abbonamento alla rivista, per tutti gli associati tranne gli Associati Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione FEI.
*****
La Gioventù Esperantista Italiana (IEJ) è la sezione giovanile della FEI e ne fanno parte gli Associati fino all'età di 30 anni. La IEJ cura la redazione della rubrika "Nova Sento" che compare in questa rivista.
*****
Registrazione al Tribunale di Milano n.85 del 27 febbraio 1970.
Stampa: Tipografia Agnesotti - Str. Tuscanese km 1,700 - 01100 Viterbo - Tel.0761 251 025
Progetto grafico - Grafika ideo
Federica Ursig - Davide Amadei
*****

In copertina: Internacia Vespero de la Kongreso, kun multaj verdaj steluloj: Ĵomart, Bronstein, Nataŝa kaj Handzelik (Foto de Aleks Kadar)

KONGRESE

Kelkaj komentoj pri Linjano

Fabio Bettani

Boris Mandirola prezentas la aktivadon de IEJ al novuloj

Foto de Aleks Kadar

Pasintaŭguste, plurcentoj da samideanoj partoprenis la nacian kongreson de Itala E-Federacio, kiu unuafoje dum pluraj jaroj sukcesis kunvenigi tiom multenombran partoprenantaron. La kongreso festis la centjariĝon de IEF; sed verŝajne plej logaj por kongresanoj (kaj ĉefe por eksterlandanoj) estis la ĉemara situo kaj la varma, agrabla vetero kiu daŭris preskaŭ la tutan semajnon.

Mi evitos la ĉiaman, tradician bildigon de kongresoj kiel renkontiĝoj kie "oni interkompreniĝas sen bezono de interpretistoj" – tiajn priskribojn la leganto povos facile retrovi en la pasintjaraj arĥivoj de la revuo. Male, mi preferas enfokusigi la novaĵojn, per kiuj ĉijare iom moderniĝis kaj renoviĝis la itala kongreso. Unue, la aranĝon karakterizis ĉeesto de multenombra junula partoprenantaro: krom bone konataj aktivuloj de la junulara movado, kolektiĝis almenaŭ dudeko da aliaj junuloj, parte italaj, parte neitalaj.

Indas mencii, ke tio almenaŭ parte ŝuldiĝas al tre taŭge elpensita konkurso, kiu donacis senpagan aliĝon al manpleno da novbakitoj el la retpoŝta kurso KIREK kaj el lingvokursoj ĉe lokaj grupoj.

Esperindas, ke tiaj konkursoj (pluraspekte plibonigindaj, sed ja sukcesegaj) iĝu kutimaj ĉe la venontaj naciaj kongresoj de la Itala Federacio kaj de la Junularo.
La kongreso ankaŭ abundis je eksperimentaj programeroj. Oni organizis tutan vicon da noktomezaj prelegoj, kiujn gvidis nia famkonata lingvisto Davide Astori: ja rimarkinda antaŭenpaŝo, se konsideri ke nur antaŭ du jaroj (en Groseto) la nokta programo tute nuliĝis pro malpermeso reeniri en kongresajn loĝejojn post la dekunua vespere.
Oni ankaŭ unuafoje okazigis movadan foiron en la ĉefa placo de Linjano; kadre de tiu programero, Esperanto-asocioj rajtis starigi budojn por samtempe prezenti siajn agadojn al esperantistoj kaj al lokuloj. La ideo pruviĝis bonega kaj sukcesis veki intereson ĉe la lokularo, kvankam el la organiza flanko oni nepre devos prilabori kaj plurafini la ideon dum la venontaj kongresoj. Eĉ pli grandan sukceson ĝi atingos, se estontece oni povos kalkuli je antaŭdifinitaj helpantoj por movi tablojn kaj pendigi reklamafiŝojn - simbolan repagon povus eble donaci la foirantoj mem, kiuj rajtas vendi siajn varojn.
Kroma menciinda apartaĵo de la kongreso en Linjano estis la ĉiuvesperaj koncertoj, kiuj plene furoris: eble nur dum tiuj vesperaj programeroj la tuta kongresanaro kuniĝis en unu ejo. Ne nur junuloj dancadis sub la supreniranta luno je la muziko de JoMo. Endas mencii, ke kelkaj kongresanoj plendis pro manko de italaj koncertistoj kaj ioma foreco de la koncertejo rilate al la plej homriĉaj partoj de la turisma vilaĝo, kio rezultigis dividon inter itallingva publiko ĉe la ĉefa koncertejo kaj esperantlingva publiko en ties izolita angulo. Ĉiuj tamen konsentos, ke la ĉijara vespera programo estis sen ajna dubo multe pli sukcesa ol la pasintjaraj. Konklude, la ĉijara kongreso en Linjano estis ne nur bona okazo por amikumado kaj esperantumado, sed ĝi ankaŭ vekis promesojn por la estonteco de italaj naciaj kongresoj, kiuj esperinde plu alprenos sian ĝustan vojon kiel plenrajtaj internaciaj aranĝoj aparte logaj por eksterlandanoj.

La sukcesa kurso de itala lingvo gvidita de Davide Astori

La koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa

KONGRESE

Tanto sole e cultura a Lignano

Aldo Grassini

Sole, mare, verde e tanto esperanto! Una formula magica che quest'anno ha portato tanta gente al Congresso Nazionale a Lignano Sabbiadoro, complice anche la distanza oceanica dell'U.K. cubano. In effetti, da molti anni non si vedevano tanti esperantisti al Congresso della F.E.I. e non certo per l'affollarsi degli italiani (sempre pochini: 120), ma per la calata in massa di moltissimi stranieri, specie dall'Est europeo. Insomma: circa 300 partecipanti da oltre 30 Paesi. Già queste cifre parlano chiaramente del successo della manifestazione: la larga rappresentanza internazionale in un raduno esperantista è come il sale in una buona pietanza. Ciò che più conta per noi, - lo sappiamo bene, - è ritrovare vecchi amici e conoscerne di nuovi, piovuti da paesi lontani, ma vicini nell'amore per la nostra cara lingua.
E a Lignano, con le dovute differenze, abbiamo un po' respirato l'aria dei congressi universali. E sì, un minicongresso universale (neppure tanto "mini") con un programma nutrito e qualificato che ha proposto conferenze, presentazione di libri, corsi di tutti i livelli, concerti ed un gran numero di escursioni, perfino un intervento video appositametne registrato da Moni Ovadia. Alcuni tra i più bei nomi dell'intellighenzia esperantista hanno impreziosito un programma già molto stuzzicante. Una settimana densa di attrattive che hanno saputo tener botta contro la tentazione di una nuotata nel mare lì a due passi!
Molto bello il luogo: un grande centro per giovani in mezzo alla pineta e in riva al mare! Perfino il cibo nella grande mensa era di ottima qualità, anche se la confusione e le code del self service lo facevano andare talvolta un po' di traverso.
Insomma, un bel Congresso con un notevole salto di qualità che mi costringe a riconoscere che ha avuto ragione Brunetto Casini, il grande assertore della nuova formula.
Naturalmente non è andato tutto liscio e qualche problemino c'è stato, soprattutto perchè i pochi eroi che si sono assoggettati alle fatiche dell'organizzazione avrebbero avuto bisogno di essere maggiormente supportati. Poi, qualche defezione dell'ultim'ora ha costretto chi gestiva il programma a spericolati equilibrismi per riaggiustarlo in tempo reale. Alla fine tutti contenti e chi era assente ha avuto torto ancora una volta!

Lignano Sabbiadoro, la spiaggia nei pressi del Congresso

S.Vito al Tagliamento, il palazzo sede della prima casa editrice esperantista: A. Paolet

KONGRESE

Torino 2011

Fabrizio A. Pennacchietti

Da poco più di una settimana si è chiuso il 77° Congresso Italiano di Esperanto, che ha avuto luogo a Lignano Sabbiadoro (UD) dal 21 al 28 agosto 2010. È stato, a giudizio di molti, il congresso nazionale meglio riuscito in questi ultimi venti anni, e questo per molteplici ragioni. Innanzi tutto è stato brillantemente collaudato il nuovo modello organizzativo che Brunetto Casini ha lanciato in veste di 'coordinatore congressuale' della FEI. Il comitato che ha gestito il congresso, formato da Renato Corsetti, Brunetto Casini, Laura Brazzabeni, Nicola Minnaja e Michael Boris Mandirola, ha dato il meglio di sé, assicurando una sapiente regia dei diversi eventi e riuscendo a superare con garbo e pazienza gli inevitabili disguidi.

La confortevole sede del congresso, il ricco ventaglio di avvenimenti offerti dal programma e la straordinaria piacevolezza di Lignano e delle sue spiagge hanno favorito l'adesione di 332 esperantisti di

ben 37 paesi di tutti i continenti. È vero che circa 80 persone che si sono iscritte non hanno potuto partecipare, soprattutto perché le autorità consolari italiane non hanno loro concesso il visto d'ingresso. Ma è pure vero che i congressisti italiani sono stati questa volta vistosamente in minoranza rispetto agli stranieri. Al sorprendente fenomeno ha certamente contribuito la lontananza dall'Europa dei due maggiori convegni internazionali di Esperanto, il 95° Congresso Universale a Cuba e il 6° Congresso Asiatico in Mongolia.

Per riscontrare un'affluenza altrettanto se non più massiccia di stranieri a un congresso esperantista italiano bisogna risalire al 62° congresso nazionale che ha avuto luogo a Torino dal 23 al 26 agosto del 1991, l'anno del Congresso Universale di Bergen, in Norvegia. La caduta del Muro di Berlino (nov. 1989) e il conseguente crollo dell'Unione Sovietica hanno offerto per la prima volta a sudditi di quell'impero la possibilità di accedere ai nostri congressi, e in effetti a Torino si registrarono per la prima volta numerosi e qualificati esperantisti dei paesi dell'Europa orientale, in particolare dalla Polonia, dalla Bulgaria e dalla Russia.

Ebbene, l'anno prossimo il congresso nazionale di Esperanto ritornerà dopo 20 anni a Torino (20-26 di agosto 2011). Il comitato organizzativo, guidato da Brunetto Casini, si augura di rinnovare il successo ottenuto quest'anno a Lignano e di emulare i fasti del 1991. Si farà tesoro delle esperienze acquisite. Incoraggianti sono già le premesse. La sede del congresso è un prestigioso centro per convegni internazionali di carattere scientifico, la Villa Gualino, situata su un'altura in vista di tutto l'arco delle Alpi occidentali. Nel 2011 la città di Torino, per celebrare il 150° anniversario dell'unità d'Italia, allestirà quattro grandi mostre e un programma di straordinari eventi artistici e culturali. Il capoluogo piemontese, noto come centro propulsore e principale laboratorio nazionale di innovazione e trasformazione in tutti campi della vita sociale, propone più di 50 musei, tra cui spiccano il Museo Egizio, il Museo Nazionale del Cinema e il Museo della Sindone, mete di visitatori di tutte le parti del mondo.

Presto verrà reso noto il programma del 78° Congresso Italiano di Esperanto. Esso conterrà come a Lignano il nome di conferenzieri e di artisti in gran parte stranieri, allo scopo di invogliare gli esperantisti italiani ad iscriversi in numero maggiore, in modo da condividere in Italia l'esperienza unica di transculturalità che l'Esperanto è in grado di offrire.

A Lignano un Congresso da record

Laura Brazzabeni

Congresso nazionale o internazionale? Forse un "*itala-internacia kongreso*", così come mi è piaciuto definirlo quando ero a Lignano. Cosa è mancato a questo congresso? Forse solo gli italiani che sono stati molto meno rispetto agli stranieri.

E ora un po' di numeri:

- iscritti 332 (italiani un po' meno di 100) provenienti da 37 nazioni (Polonia, Russia, Francia, Spagna Germania, Congo, Belgio, Armenia, Ucraina, Tanzania, Slovenia, Olanda, Svizzera, Togo, Malì Gabon, Romania, Bulgaria, Finlandia, Lituania, Canada, Madagascar, Rep. Ceca e tanti altri paesi del mondo
- partecipanti effettivi 266 (alla fine solo una persona proveniente dall'Africa ha ottenuto il visto di ingresso in Italia, problemi anche con i cinesi e qualche armeno)
- età: da 2 a 90 anni
- non sono mancati i gruppi organizzati: 3 pullman di polacchi e 1 di russi
- gite: 8, di cui 3 di mezza giornata
- conferenze, corsi, conferenze, fakaj kunvenoj, presentazioni di libri, esami: una marea!!!
- concerti: 1 per sera.

E ora cosa fare? Certo ricordare per chi ha partecipato a questo "indimenticabile" congresso e RIPETERE l'esperienza, iscrivendosi in massa al prossimo congresso italiano che si terrà a Torino dal 20 al 27 agosto 2010, ISCRIVENDOSI GIA' DA SUBITO PER PAGARE UNA TARIFFA BASSA. Ci aspettiamo tanti stranieri, ma anche tanti tanti italiani, così anche noi italiani potremo di nuovo godere di questo stupendo "*etoso*" internazionale.

INFORM@DIKO

EsperantoItalia.it

Daniele Binaghi

Kiel vi jam scias (se vi entute legis miajn antaŭajn artikolojn... se ne, tuj iru serĉi en via arkivo), multaj el la enhavoj de la retejo Esperanto.it translokiĝis al nova spaco, kiu nomiĝas EsperantoItalia. Spaco, kiu ege similas al unu el tiaj skatoloj en kiuj oni metas multajn aferojn, kelkfoje utilajn kelkfoje ne, kaj kie vi plezuriĝas serĉante, traserĉante kaj, foje, trovante... Do, ankaŭ ni traserĉu ĝin, nun!
La hejma paĝo aperas sufiĉe pura kaj legebla, en siaj verdkoloraj nuancoj; menuo klaras je la maldekstra flanko, kaj aktualaĵoj plenigas la ceteron de la paĝo.
Kaj jen tuj la unua dubo (vi jam scias ke mi ŝatas ilin): kiajn homojn celas tiu ĉi retejo? Ĉu italparolantojn, aŭ italajn esperantistojn (mi ne demandos pri la eksterlandaj esperantistoj, ĉar mi jam komprenis ke en Italio oni fajfas pri ili)? Celo, por retejo, estas grava problemo: se ĝi ne klaras, oni ne vere povas konstrui bonan kaj taŭgan informilon. Kaj EsperantoItalia – ĝia hejma paĝo, kaj ankaŭ la ceteraj - enhavas miksaĵon de la du lingvoj (ekzemple: "*Incontri esperantisti* - Vi trovas ĉi-sekve la liston de la renkontiĝoj, kunvenoj, kaj eventoj aranĝataj de la italaj Esperanto-grupoj tra la tuta Italujo en ĉiu momento de la jaro"), kaj tio tute ne helpas. Pli bone selekti nur unu lingvon, aŭ doni eblecon ĝin elekti ie ajn. Estas spaco supre, maldekstre, por du flagetoj… Aktualaĵoj ankaŭ estas dulingvaj; do, denove, iu, kiu ne estas dulingva, perdos iom da informoj. Ĉu indas?
Aliaj cimetoj nepre fiksendaj, por ke ĝi aspektu pli profesia: ligiloj kaj informoj ofte aperas kiel bildoj, kaj do estas tute ne indekseblaj rete (uzante almenaŭ la ALT-markon por aldoni informojn, oni solvus la problemon kaj helpos ankaŭ al

Hejma paĝo de la retejo, kun kelkaj el la problemoj priskribitaj en la artikolo

la blinduloj); la enblemetoj uzitaj por montri al kio rilatas la novaĵo estas malbonkvalitaj kaj, ŝajne, ne ĝisrandigitaj; la menuero "hejmo" estas la lasta, kaj tio estas tute malkutime en interreto, do pli bone resuprenigi ĝin, kaj aldoni ligilon ankaŭ al la marko de EsperantoItalia en la supra parto de la paĝo.
De la hejmpaĝo oni facile povas atingi multajn servojn. Bedaŭrinde, kiel ankaŭ asertas Gianfranco Molle, prizorganto de la retejo kaj ĉiam disponebla helpi tiujn kiuj, sen havi komputikajn konojn, deziras kunlabori, "la servoj jam disponeblaj ne estas tiel uzataj kiel ni ŝatus". Nunaj sekcioj estas kvin:
FEI (titoloj en la itala) prezentas la estraranojn de IEF (necesas pli da informoj, kaj fotoj pli bonkvalitaj) kaj ties statuton, la lokajn grupojn (malbela tabelo, kaj mankas utilan mapon kiu ekzistis, laŭ mia memoro, en la antaŭa retejo), informmaterialon ankaŭ elŝuteblan, kaj katalogon de libroj publikigitaj; bedaŭrinde, la paĝo pri la nacia revuo estas daŭre malplena, kaj espereble baldaŭ oni decidos aldoni malnovajn PDF-dosierojn por ke ili estu legeblaj ankaŭ per interreto. De la listo de lokaj grupoj oni povas atingi iliajn retejojn, ofte gastigitaj ĉe la sama servilo de EsperantoItalia.
ESPERANTA VIVO (titoloj en Esperanto) prezentas la Esperantajn renkontojn (pri tiu sekcio okupiĝas Ermigi Rodari), kaj - denove - la katalogon de libroj kaj la listo de la italaj kluboj (kies enhavoj estas en la itala).
INSTRUADO (titoloj en Esperanto) kondukas al la retejo de IIE (pli bone se ĝi malfermiĝus en aparta paĝo, ĉar fakte temas pri alia retejo), al lerniloj (esence, vortaroj; oni bezonus pli da “iloj”), al biblioteko (verŝajne: kiam mi provis, nur mi atingis eraran blankan paĝon), kaj al listo de kursoj en Italujo (paĝo en la itala).
LITERATURO/MUZIKO (titoloj en Esperanto), kies celo unue estis disponigi recenzojn al eldonejoj por faciligi ilian taskon disvastigi informojn pri novaj eldonoj, estas pli malpli malplena, kaj denove bedaŭrinde, ĉar oni povus uzi ilin por pli bone prezenti novajn librojn, muzikdiskojn kaj, eble, ilian historion (verŝajne oni povus publikigi ankaŭ la historion de la Espo-muziko, kiun Flo verkis kaj kiun vi povas legi en tiu ĉi revuo).
Fine, la sekcio *OFICEJO* estas privata de IEF; verŝajne, ne necesus doni tiom da emfazo al ĝi, precipe ĉar, se oni ne enmetas ajnan/ĝustan pasvorton, oni estas kondukitaj al blanka erara paĝo.
Komunaj problemoj je multaj paĝoj: malsamaj menueroj enhavas ligilojn al la samaj paĝoj; tabeloj ofte ne uzas saman format-stilon (iuj verdas, iuj blankas, iuj havas bordojn kaj iuj aliaj ne); teksta grandeco ne samas ĉie; la katalogo de libroj estas nur PDF-formata, kaj certe aldoni ankaŭ HTML-version estus utile por ret-serĉiloj; kelkfoje sekcia menuo aperas sube en la paĝoj – ege utile, eĉ se ĝi devus esti aranĝita pli bone –, kelkfoje ne.

Aparte grava estas la ĝisdatigo de la informoj: ne eblas ke ili aperu en la retejo nur post kiam la evento/kurso jam okazis. Sed pri tio kulpas ankaŭ ĉiuj samideanoj, kiuj, sciante pri iu interesa novaĵo, ne tuj komunikas ĝin por ke ĝi estu publikigita. Mi persone opinias ke, se IEF kredas je la grava funkcio de EsperantoItalia, devus ĝin plibonigi, kaj stile kaj enhave; sed certe italaj esperantistoj devos pli multe kunlabori kun tiuj, kiuj zorgas pri la retejo, por ke ties laboro povu doni fruktojn.

Vi trovas ĉi-sekve la liston de la renkontiĝoj, kunvenoj, kaj eventoj aranĝataj de la italaj Esperanto-grupoj tra la tuta Italujo en ĉiu momento de la jaro.

Se vi mem volas partopreni ilin, simple legu.

Se vi mem aranĝas ion, por aperigi vian manifestacion en retejo bonvolu informi pri ĝi la kunordiganton de la renkontoj, Ermigi Rodari - piazza Piola 5 - 20131 Milano, aŭ per mesaĝo al: ermigi @ infinito.it aŭ telefone al 022364190.
Bonvolu doni ĉiujn disponeblajn indikojn: daton, lokon, adreson de la loko, adreson de la respondeculo kun lauxeble telefon-numero kaj ret-adreso, programon, ktp

data	luogo	
		Esperantaj Renkontoj dum 2010
2009 08 21-28	Lignano Sabbiadoro	**77° Itala Kongreso de Esperanto** (leggi tutto)
2010 06 4-8	Tossignano (BO)	**24° Congresso dell'UECI** (programma)
2010 05 28 al 06 01	Trieste	**Karstaj Tagoj 2010** (programma)
2010 05 14-16	Montescheno (Verbania)	**2-a MJS** - Montara Junulara Semajnfino. (programma)
2010 03 31 al 04 06	Roncegno (TN)	**34° IJF - Internacia Junulara Festivalo** - Festival annuale della Gioventù Esperantista Italiana (programma)

Listo de la renkontoj kaj eventoj okazantaj en Italio; stilo povus esti plibonigita por pli klara kompreno

RAPORTE

Raporto pri vojaĝo al Rusio

Paola Tosato

Ermitage, iama reĝa palaco, nuntempe muzeo

Estis mia deziro viziti Rusion, okazis tiun ĉi jaron la 26a Rusia Esperanta Kongreso en Sankta Peterburgo kaj la postkongreso en Moskvo do kiam mi trovis anoncon de tiu ĉi renkontiĝo mi tuj aliĝis ĉar mi havis tiel la okazon viziti la landon kaj partopreni en alia Esperanta aranĝo kiu estas por mi ĉiam plezuro.
Mi foriris el Bolonjo kun grupeto de ses italoj per aviadilo ĝis Sankta Peterburgo la 26an de majo. Mi mendis hoteleton proksime de la kongresejo, je 15 minutoj per metroo; la unuan tagon ne estis programo do mi aldoniĝis al paro de Ĉeĥoj por promeni iomete proksime de la hotelo; la sekvan tagon estis la solena malfermo de la kongreso kun parolado de la organizantoj: ili diris ke ĉi tiun jaron aliĝis al rusa kongreso homoj el proksimume 14 diversaj landoj, malsame ol kutime, ni estis pli ol 200 kongresanoj, estis ankaŭ koncertoj, teatraĵoj kaj mi salutis ĉiujn partoprenantojn per kelkaj vortoj, same faris aliaj eksterlandanoj. La sekvajn tagojn mi partoprenis en kvar ekskursoj: la unuan tagon ni iris en la fortikaĵo "Sankta Petro kaj

Paŭlo" kaj ni faris rondiron tra la urbo per buso; la duan tagon ni estis en Peterhofo kaj ĝia parko (la somera sidejo de la caroj). La palaco posedas multnombrajn ĉambrojn, el kiuj mi preferas la dancan ĉambron en baroka stilo kun grekaj kaj romiaj pentraĵoj, faritaj de italaj artistoj kaj la tronseĝan halon, la plej grandan halon en klasika stilo, koncerne la parkon ni povis admiri fontanojn kun akvoludoj kaj ĝardenojn plenajn de buntaj floroj. La tria tago estis dediĉita al la vizito de Ermitaĝo kiu estas dividita en tri etaĝoj kaj en vintra palaco, malgranda, granda kaj nova Ermitaĝo kaj en ili estas artverkoj el diversaj landoj kaj periodoj; vespere estis ekskurso per ŝipo sur la rivero Neva kun popolaj kantoj kaj muzikoj. Danke al ĉi tiuj ekskursoj mi havis eblecon ekkoni la plej gravajn monumentojn kaj la antikvajn belaĵojn de Sankta Peterburgo kaj iomete da historio de ĉi tiu lando. Koncerne la programon de la kongreso mi spektis unu prelegon, kelkajn koncertojn kaj teatran prezenton: “Dek tagoj de Kapitano Postnikov” (vere interesa teatraĵo). La lastan tagon matene estis la solena fermo de la kongreso en kiu denove mi faris komenteton pri mia restado en Sankta Peterburgo, posttagmeze mi promenis laŭ unu el la plej famaj stratoj, Nevskij avenuo, kie situas ankaŭ la hotelo en kiu mi loĝis. Mi estis ankaŭ en Nevskij placo, tiel nomata honore de Alexander Nevskij, venkinto de la batalo kontraŭ Svedoj.
La 31an de majo nokte grupo de 20 personoj vojaĝis el Sankta Peterburgo per trajno ĝis Moskvo por la postkongreso. La unuan tagon estis planita vizito al Ruĝa Placo, al Maneĝo, al Aleksandrovskij Ĝardeno, al Teatra Placo, al Katedralo de Kristo la Savinto kaj al grandmagazeno GUM kie estas vendejoj pri modo el diversaj landoj. Vespere okazis ekskurso laŭ la linio de la Moskva Metroo, la plej granda certe en Eŭropo, eble ankaŭ en la mondo, kaj kiu estas plena de artaj verkoj. La duan tagon ni vizitis la Kremlon, la Endormiĝan Katedralon kaj promenis tra la stratoj Malnova kaj Nova Arbat (en la centro de la urbo). Vespere estis organizita renkontiĝo kun moskvaj esperantistoj de la Universitato: do estis malgranda prelego, koncertoj, kaj teumado kune. La trian tagon ni iris ĉe la Novvirgulina monaĥinejo kaj ĉe la memortombejo kie estas entombigitaj artistoj, sciencistoj, politikistoj, literaturistoj, poste estis promenado tra la malnovaj stratetoj de la urba centro. La kvaran tagon estis vizito de la kvartalo Ostankino kaj veturo per solrela supra metroo; posttagmeze estis interesa kaj originala afero: la vizito de la Muzeo de Astronaŭtiko, do ni povis enmergiĝi en la pli moderna areo de la urbo. La kvinan tagon estis vizito de la fama bildgalerio Tretjakov kie estas artverkoj de la mezepoka ĝis la dudeka jarcento; poste ni promenis en la Parko de la Venko kie estas multaj monumentoj pri la mondmilita epoko. La sesan tagon estis la forveturo de Moskvo al niaj hejmoj. Koncerne la manĝaĵojn ni iris en tradiciajn kafejojn kie ni gustumis la rusan kuirarton, kaj ĉiu vizito estis gvidita de moskva ĉiĉerono kiu parolis Esperante.
Do mi povas diri ke ankaŭ la postkongreso en Moskvo estis vere bela sperto por mi ĉar mi esploris ĉi tiun urbon riĉan de historio kaj samtempe de teknologio; mi estis plene kontenta pri la manĝoj; mi renkontis viglajn kaj simpatiajn rusojn (mi ankaŭ kun novaj homoj); la restado estis organizita precize kaj efike. Konklude mi ne adiaŭis Rusion, sed mi nur diris ĝis revido.

Sankta Peterburgo, somera reĝa palaco

KULTURO

Historio de E-Muziko (2)

Floréal Martorell
reviziita de Daniele Binaghi

Floréal «Flo» Martorell, nia muzika ĉiĉerono, daŭrigas sian rakonton pri la historio de muziko en Esperantujo. Ĉi-foje li rakontos pli detale pri la 80-aj kaj 90-aj jaroj.

Naskiĝo de esporokmuzika movado

En 1982 -83 la aŭtorkanta epoko transiris al la rokmuzika, kun la naskiĝo de la unua internacia Esperanto-rokbando **Amplifiki**, modlita en la kerno de junularaj espo-aranĝoj kiaj IS kaj IJK. Ilia unua kasedo, "*Tute ne gravas*", aperis ĉe LF-Koop en 1987.
De tiam komenciĝas roka eksplodo en la junulara espomovado, kun apero en Berlino de **La Mondanoj** kun **Aaron Koenig** kaj **Carsten Kintermann**.
En orientaj landoj, malantaŭ la ferkurteno, ankaŭ la rokbando **Team'** laŭ instigoj de la juna kaj aktiva **Stano Marĉek** ekesperantiĝas kaj koncertas en esp-aranĝoj; viva koncertfragmento aperas sur la "*Esperanta Songazeto N-ro 2*" de LF-Koop en 1983.
En 1986, nova bando, **Persone**, naskiĝas okaze de la unua Kultura Esperanto-Festivalo en

Rozmariaj Beboj, unu el la unuaj rokbandoj

Svedio. Ili memproduktas unuan kasedon 62-minutan en 1987. Esporok-koncertoj dum junularaj renkontiĝoj ekfloras kun **Amplifiki**, **La Mondanoj**, **Persone** en Berlino, Bonn ("*Domo en Bonn*"), Hungario, ktp.
En 1986, **La Barbuloj**, kantria papaga bando el Ĉeĥio, eldonas vinil-disketon 4titolan helpe de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj distribuita de Supraphon.
En Slovakio, la bando **Team'** tute profesiiĝis kaj furoras en diversaj konkursoj gajnante orajn najtingalojn, kaj en 1989, la bando aperigas kasedalbumon "*Ora Team*" en Esperanto, ĉe LF-Koop; tiu sama kasedo aperas paralele en tiama Ĉeĥoslovakio en la tutnacia diskeldonejo neesperantista Opus.
ToBoCo, hungara marĝena folk-blus-bando kun la neforgesebla kantisto Balaĵ, prezentis sian unuan memproduktaĵon, la kasedon "*La unua Frapo*" dum IJK en Kerkrade en 1989.
Intertempe naskiĝis en Frislando (Nederlando) la profesia folkbando **Kajto**. **Kajto** alportis grandan revolucion en la espomuzikkulturon, ĉar en 1989 ili memproduktis per propra diskeldonejo la unuan KD-on (kompaktan diskon) iam aperinta en Esperantujo. Tiu kuraĝa iniciato lanĉis grandan instigon en la espokulturmedioj, kaj anoncis la finon de la kaseda epoko.
En tiu sama etosa periodo kreiĝis EUROKKA, Esperanto-Rok-Asocio, bazita en Donneville,

Ĵomart kaj Nataŝa, kazaĥa paro



Juna JoMo, poliglota kantisto

ĉirkaŭurbo de Tuluzo en suda Francio. En 1990, EUROKKA lanĉis sian unuan produkton pere de sia ĵus-kreita diskeldonejo Vinilkosmo: temas pri kompil-disketo enhavanta 2 titolojn de **Amplifiki** kaj du aliajn de nova rokbando el Tuluzo, la **Rozmariaj Beboj** kies kantisto estas **JoMo**. Kelkajn semajnojn poste, EUROKKA eldonis sian unuan numeron de "*Rok-gazet*": revuo kies celo estas informi kaj kunordigi la disajn kontaktojn kaj muzikagadojn en la espomuzikmondo por instigi pli riĉigon kaj kreskigon de Esperanto-romuziko.

Disvolviĝo de esporokkulturo

La hodiaŭaj teknikoj evoluis tiom multe, kaj fariĝis ankaŭ tiom malplikostaj, ke ne plu tolereblas fuŝi koncerton aŭ produkton. La espomuzikbandoj pli kaj pli havas profesian kvaliton, kaj tio pliriĉigas kaj plialtigas la ĝeneralan nivelon de espomuziko.
La 90-aj jaroj alportis plej diversajn produktojn, ĉu kasedajn, ĉu kompaktdiskajn memproduktitajn aŭ ĉe diskeldonejoj, kiel ekzemple **Aaron Koenig** ("*Brazilumas Esperante*", 1989), ***Amplifiki*** (Svedio, laŭ la periodoj), **Solo** el suda Hispanio, **Amplifiki** (kun nur svedoj), **Persone** el Svedio, **Kajto** el Nederlando, **Flávio Fonseca** el Brazilo, **Ĵomart Amzejev** kaj **Nataŝa Gerlaĥ** el Kazaĥio, **La Mevo** el Japanio, **Tutmonda Muziko** el Germanio, **Vladimir Soroka/Andreo Berce** el Ukrainio/Rusio, **Akordo** el Nederlando kaj **JoMo** el Tuluzo, Francio.
Ankaŭ tiuj jaroj vidis la muzikan kvaliton multe pliboniĝi, de amatoreco muzikgrupoj fariĝis kvazaŭ profesiuloj helpe de la novaj perfektigaj surbendigtek-nikoj, kiel oni povas konstati interalie en la lasta kasedalbumo de **Amplifiki** "*Ĉu ne?*".
Pluraj artistoj profesiaj interesiĝis pri la fenomeno de Esperanto-muziko, kiel **Jacques Yvart**, kiu finfine esperantistiĝis, **Rainer Conrad** ("*Tutmonda Muziko*"), aŭ **Esperanto** el Normandio en Francio, **Rob de Nijs** stelulo el Nederlando, **Rondo** bando el Litovio, **Esperanto** ("*El Bosco*", Warner, Hispanio) kaj **Ewe-Calyptus**, kiu eldonis la KoDiskon "*Unu voĉo*" okaze de la UK en Adelaido en Aŭstralio, 1997.
En "*Vinilkosmo-Kompil' Vol.1*" kaj "*Vinilkosmo-Kompil' Vol.2*" aperis **La Alburnoj** (Les Ablettes), **EV** (krome, en unutitola KD), **Tutti Frutti**, **Massilia Sound System**, **Rémy Walter** (krome, en 4-titola remiksa KD), **N.A.T.**, **Fabulous Trobadors**, **Luanda Cozetti** kaj aliaj, kaj ĉiuj kantis papage. Laste en tiu listo aldonendas **Magnus** el Svedio, kiu memeldonis sian KoDiskon kaj ankaŭ disponigas ĝin en siaj propraj TTT-paĝoj. Ankaŭ aliaj bandoj famaj en grandaj komercaj diskeldonejoj elvokis esperanton uzante la nomon kiel titolo aŭ uzante esperantoklarigojn; tion faris ekzemple **Elektric Music** (Bartos, eks-Kraftwerk, Germanio), **Shadowfax** (Usono), **Elvis Costello** (Britio), **Sonic Youth** el Usono, **Cólor Humano** (Hispanio), **Fabulous Trobadors** el Tuluzo/Okcitanio, **Freundeskreis** (Amikaro) el Germanio, **Esperanto** el Kanado, **Esperanto** el Hispanio, **Rick Braun** (Usono) kaj **Esperanto** el Hindujo.
Ankaŭ grandaj steluloj, kiel **Michael Jackson** kaj **Enrico Macias**, anoncis ke ili intencas uzi Esperanton; tamen, same kiel **Beatles**, nenion faris.
Esperantomuzik-kulturo, sekvis kun iom da malfruo la evoluon de la ĝenerala rokmovado, kaj nur de du aŭ tri jaroj ni povas konstati ke subgrundaj rokmuzikoj enpenetras ĝin.
Unuaj pioniraj bandoj estis **La Bleka Forfikulo kaj Siaj Orelboristoj**, **Piŝamandurjes** (anarkopunkfolkbando el Katalunio, Hispanio) kaj **Piĉismo** (kaospunkkora bando el Ukrainio). Postsekvis bandoj kiaj **Araŭkana** kaj **Averto al Gepatroj** (hardkoro kaj grinckoro el Brazilo), **Klingo** (anarkipunko el Ukrainio), **KRIO de MORTO** el Pollando kaj **Pendumito** el Pollando.
En Aprilo 2000 aperis "*Esperanto Subgrunde Kompil*", prezentanta averaĝe 2 titolojn de 15 bandoj brumuzikaj, kuneldone

Ĉu vi pretas por la alveno de Dolchamar?

inter La Blua Papilio (subgrunda eldonejo el Brazilo estrita de **Ĵuljo Calegari**) kaj Vinilkosmo. En ĝi aperas esposubgrundaj bandoj, interalie la mitofama **Piĉismo** kaj aliaj bandoj, kiuj kantas papage, ĉefe el Brazilo kaj Francio, kiel ekzemple **Traŝ-Bog**. Antaŭ kelkaj jaroj nova fenomeno estas la apero de espo-afrikmuzikaj bandoj, kiel **FreeMagniZhou** kaj **Afrika Espero**, ambaŭ aperintaj en "*Vinilkosmo-Kompil' Vol.2*", **Mayoama Diankembo**, **Vigla Muziko**, ktp.
Eĉ Hip-hopon (repo) eniris esperantujon, sed ankoraŭ tre malmulte, per la **Flugantaj Bananoj** (el Germanio), **Dolchamar** el Finnlando kaj **Eterne Rima** el Pollando.
Tekno-haŭzo kaj ĝangalmuzikoj ankoraŭ ne sukcesis firme enpenetri espokulturon, sed jam de jaroj **Solo** alportas al ĝi vere avangardan elektronikan muzikon.
Vinilkosmo lanĉis projekton ("*Elektronika kompilo*") kunlabore kaj helpe de **Gunnar Fischer** kiel arta reĝisoro pri kompilaĵo de tiuspecaj muzikoj, ni diru elektronikaj (elektropopo, tekno, haŭzo, trenco, denco, drumenbaso, kaj bigbito), kiuj helpe de Interreto bone sukcesas disvastiĝi.
Plej lasta fenomeno estas la Dĵ-oj (diskĵokeoj) **Kunar**, **Njoki**, **Roĝero**, ktp... (eĉ **Flo**!), kiuj dum ĉiuj gravaj espoaranĝoj dĵoumas; komence estis malfacile trovi taŭgajn espomuzikojn, sed de du jaroj, dank'al la lastaj eldonaĵoj, materialo en Esperanto por dancigi homoj en diskoteko estas alvenanta.
Jam estis diversaj provoj pri tutnokta espoteko fare de **Dĵ Flo**! dum KEF kaj IF kaj de Dĵ Kunar dum IS, IJK kaj IJF; la rezultoj estis kontentigaj, kaj nun eblas tute komforte fari regulajn espotekojn dum espoaranĝojn dank'al plimultiĝo de tiaj dancigaj muzikoj en Esperanto kaj al alveno de novaj Dĵ-oj (kompreneble, "*La Bambo*" estas ankoraŭ grava simbolo kaj nepraĵo por espoteko).

Di esperanto in esperanto è una rapida ma intensa carrellata dei vari stadi attraversati nella sua storia centenaria dalla lingua ideata da Lazar Ludwig Zamenhof. L'esperanto è scandagliato nel testo da prospettive storiche, letterarie, linguistiche ed ideologiche; non si tralascia mai l'aspetto filantropico altamente encomiabile del suo fondatore, convinto e convincente creatore di una ipotetica unica lingua per il mondo intero. Il saggio percorre le fasi dell'esperanto sino ad oggi mantenendo un approccio giornalistico e realistico del fenomeno, senza miopie utopiche e fuorvianti. Giuseppe Macrì è nato a Roma nel 1983. Scrive dai tempi dell'infanzia, ha curato due raccolte di poesie e una pubblicazione gastronomica a scopi benefici, per le quali ha coinvolto e coordinato 500 autori. Da sempre interessato ai temi sociali, ha fondato "Noi, briciole onlus", un'organizzazione in favore dei bambini disagiati in Italia e all'estero, di cui è presidente. A 22 anni è dottore in lingue e letterature moderne, a 25 riceve la laurea specialistica dopo un'esperienza molto formativa come docente di italiano a stranieri. A 26 anni è insignito del Premio Raeli 2009 in quanto riconosciuto tra i migliori studenti del proprio ateneo romano. Nel frattempo, con l'università per stranieri di Siena consegue l'esame internazionale abilitante all'insegnamento dell'italiano come L2 e LS.

Di esperanto in esperanto - Storia del sogno di una lingua per tutto il mondo. *G. Macrì*
Aletti Editore 2010, Roma
128 pag. ISBN: 8864983090. Prezzo € 14,00.
Acquistabile presso la FEI: feilibri@esperanto.it o in rete su:
http://it-it.facebook.com/group.php?gid=141256749226262&v=wall

DIRU TRIDEK TRI!

Latinum est. Non legitur: Temas pri latino. Oni ne komprenas ĝin

Renato Corsetti

Esperantistoj estas strangaj. Rigardu min aŭ vin mem por konvinkiĝi. Tial okazas ke bonintenca samideano en Beogrado, Pribislav Marinkovkiĉ, eldonas libreton en la serba (kun traduko al Esperanto), kies titolo estas "*Latinski Citati*". Temas pri famaj diroj en la latina kun traduko kaj klarigo al la serba kaj al Esperanto. Laŭ lia (bedaŭrinde aŭ ne misa) penso: "La latina lingvo estas instruata en ĉiuj kulturaj landoj kaj milionoj da homoj almenaŭ konas ĝin, pli aŭ malpli."
Fakte la latina lingvo estas apenaŭ instruata en ĉiuj kulturaj landoj kaj oni malpli kaj malpli komprenas ĝin. Se vi renkontas, ekzemple, normalan anglon, vi ne rajtas supozi ke li komprenas "*Vox populi, vox dei*!". Nia konata kontribuinto al ĉi tiu revuo, Chiti-Batelli, ankoraŭ sekvis la normojn de la pasinteco, kaj supozis, ke normale klera leganto devas kompreni ne nur la latinan, sed ankaŭ la germanan, kio validis en universitataj medioj iam, sed ankaŭ tie ne plu.
Mi rimarkis tra la jaroj, ke multaj italoj metas en esperantlingvajn tekstojn latinajn dirojn, kiujn ili uzus en la itala. Tion mi malkonsilas pro respekto al la ĉinoj, mongoloj, japanoj kaj ... angloj, kiuj ne komprenas ilin. Jen, do, listo de uzataj sed neuzindaj esprimoj (se vi nepre bezonas uzi ilin, aldonu tradukon, piednoton, klarigon kaj pardonpeton laŭ la okazo). Temas pri hazarda listo farita per plukado el la serba libreto kaj laŭokaze el aliaj fontoj. Mi provas doni unue tradukon laŭvortan kaj poste efektivan signifon de la diro. Multe pli da latinaj diroj normale uzataj en la itala estas en la vortaro Minnaja, kiu estas vera senfunda puto ĉi-rilate.

ab ovo = de la ovo = de la komenco, dekomence
ad hoc = por ĉi tiu = laŭcela, specifa
ad interim = intertempa, portema, duma
alea iacta est = la ĵet-kubo estas ĵetita = la decido jam estas farita, la unua paŝo de nova afero jam estas farita
ave Maria! = saluton, Maria! = preĝo al la Di-patrino
casus belli = okazo por milito, motivo por kvereli
cave canem = atentu pri la hundo
cogito, ergo sum = mi pensas, sekve mi estas/ekzistas
conditio sine qua non = kondiĉo sen kiu (oni) ne (faros ion) = absoluta kondiĉo, absolute nepra kondiĉo
cum grano salis = kun salograjno = prudente, saĝe, inteligente
cum laude = kun laŭdo = tre bone!
curriculum vitae = vivpriskribo = resuma vivpriskribo, curriculum
de facto = fakta, fakte
de jure = jura, jure, laŭjure
deus ex machina = dio el la teatra maŝino = solvanto de ĉio
divide et impera! = dividu, apartigu (la subulojn) kaj regu!
dura lex, sed lex = rigora leĝo, sed leĝo = tia estas la leĝo = Ni devas fari ion, kvankam malvolonte
ecce homo = jen la homo = jen mi = mi pretas
errare humanum est = erari estas home
errata corrige = korektu la erarojn = erar-listo
etiam tu, Brute, fili mi = ankaŭ vi, Bruto, mia filo [la frazo estas konata en kelkaj variaĵoj iom malsamaj]
ex abrupto = abrupte, sen preparo
ex aequo = egal-merite
ex cathedra = el la katedro = autoritate, oficiale
ex novo = nove, ree
festina lente = rapidu malrapide = agu atente eĉ se estas malmulta tempo
fiat lux = estu lumo = klariĝu aferoj
Hannibal ad portas = Hanibalo estas ĉe la pordoj = estas

danĝera momento
hic Rhodus, hic salta = ĉi tie estas Rodiso, ĉi tie saltu = montru vian kapablon nun pri la nuna problemo.
homo homini lupus = la homo estas lupo por alia homo = kiel malbonaj estas homoj al aliaj homoj!
honoris causa = pro honoro = honora
inter nos = inter ni, konfidence
in vino veritas = en vino estas vero = se oni drinkas, tiam oni diras la veron
in vitro = en la vitro = en Ĥemia prov-tubo = ankoraŭ en la komenca fazo
ius primae noctis = rajto de la unua nokto = feŭda rajto laŭ kiu la feŭdestro rajtis kuŝi la unuan nokton kun edziniĝonta virino.
lapsus = falo = eraro
lupus in fabula = la lupo de la rakonto = la homo pri kiu ni estis parolantaj
mea culpa = mia kulpo
memento mori =memoru (ke vi devas) morti = admono pri la neevitebla morto
mens sana in corpore sano = sana menso en sana korpo = oni devas prizorgi, eduki kaj la korpon kaj la menson
modus vivendi = maniero vivi = kompromisa aranĝo por kunvivi
mutatis mutandis = se oni ŝanĝas la ŝanĝindaĵojn, kun la necesaj ŝanĝoj
natura non facit saltum = la naturo ne faras saltojn = la evoluo estas laŭgrada
nemo propheta in patria = neniu estas profeto en sia patrujo = oni ofte estas pli taksata de eksteruloj ol de najbaroj
nihil humani a me alienum puto = nenio homa estas fremda al mi
nomen, omen = la nomo estas aŭguro = en la signifo de la nomo estas antaŭvido pri tio, kio okazos al la homo
o tempora, o mores = ho tempoj, ho moroj! = kiel malbone ŝanĝiĝis la moroj en la nuna tempo!
omnia mea mecum porto = mi portas kun mi ĉion mian!
omnia munda mundis = ĉio estas pura por puruloj = se vi estas virta, vi ne devas timi malvirtajn situaciojn
panem et circenses = panon kaj cirkojn = Oni devas doni al la popolo ion por manĝi kaj ion por amuziĝi.
pater familias = patro de familio = prudenta homo
per aspera ad astra = per krutaĵoj al la steloj = per malfacilaĵoj al sukceso
persona non grata = homo ne ŝatata
primum vivere, deinde philosofari = unue vivi kaj poste filozofiumi = agi prefere ol paroli
primus inter pares = unua inter egaluloj = ankaŭ la estro havas samajn rajtojn
pro domo sua = por sia domo = agado por io rekte koncernanta la aganton
pro forma = por la formo = formala, ne vera
pro capite = por (ĉiu) kapo = po, por ĉiu homo
qualis pater, talis filius = kia patro tia filo
quo vadis? = kien vi iras
quot homines, tot sententiae = kiom da homoj, tiom da opinioj.
sine qua non = (kondiĉo) sen kiu (oni) ne (faras ion), absoluta, deviga kondiĉo
status quo = stato, en kiu = antaŭe ekzistanta situacio, antaŭa stato
sui generis = siaspeca
tabula rasa = tabelo forrazita = entute detruita tabelo, loko, afero
Te Deum = vin, Dion (ni laŭdas) = nomo de la kanto komenciĝanta per tiuj vortoj.
timeo Danaos et dona ferentes = mi timas grekojn ankaŭ kiam ili alportas donacojn = mi timas tiujn homojn eĉ se ili aspektas bonintencaj.
tu quoque, fili mi! = ankaŭ vi, mia filo = eĉ vi!
urbi et orbi = al la urbo kaj al la mondo = nomo de beno de la papo al la homoj en Romo kaj en la tuta mondo.
veni, vidi, vici = mi venis, vidis kaj venkis = mi solvis la problemon tre rapide.
verba volant, scripta manent = vortoj flugas, skribaĵoj restas = prefere havi promesojn en skriba formo.
vox populi, vox Dei = voĉo de la popolo, voĉo de Dio = se ĉiuj diras ion, tio verŝajne estas vera.

Lasta konsileto: en Esperanto oni uzas la hindajn-arabajn ciferojn kaj nenion alian. Pro tio la romaj skribitaj ciferoj: I, II, III, IV, V, ktp., kiuj estas normale uzataj en la itala por la ordaj numeroj: 1-a, 2-a, 3-a, ktp. ne estas uzindaj en Esperanto, krom se vi volas kaŭzi amasan memmortigon inter ĉinaj esperantistoj.

Bilancio positivo per Disvastigo

Massimo Ripani

Sono nettamente positivi i primi 6 mesi di attività nel 2010 per l'agenzia di stampa esperantista Disvastigo - Lingue e Cultura, la cui redazione – grazie alla Federazione Esperantista Italiana, che ha permesso la sopravvivenza della testata – da oltre un anno continua ad informare sulla lingua internazionale esperanto e sulle tematiche del plurilinguismo. Il risultato di maggior prestigio è stata la partecipazione alle IV Giornate dei diritti linguistici con un intervento di Massimo Ripani su "I Ciuvasci tra oriente e occidente", di cui verrà pubblicato anche un saggio all'interno degli atti del convegno. La manifestazione, svoltasi dal 20 al 23 maggio 2010 presso l'Università di Teramo, è stata organizzata dall'Associazione LEM-Italia con il patrocinio del Ministero dell'Interno e il sostegno del Consiglio d'Europa. Molte le somiglianze tra la figura di Yakovlev, artefice della rinascita culturale del popolo ciuvascio, e Zamenhof: lo sfondo socio-politico della Russia Zarista a cavallo tra il XIX e il XX sec. ma anche il modus operandi. Yakovlev, infatti, diede vita alla prima scuola secondaria ciuvascia, progetto in cui investì i suoi risparmi e le donazioni private già nel 1868, ancor prima di concludere gli studi. Il contributo dell'intellettuale, tuttavia, ha un respiro molto più ampio: dopo aver perfezionato un modello di alfabeto rimasto in uso fino al 1938, nel 1872 Yakovlev pubblicò un Abbecedario per ciuvasci, in cui oltre al materiale didattico c'erano favole, racconti, indovinelli e circa 400 proverbi. La seconda metà del 2010 offre ora nuove sfide e nuovi mezzi: nell'attesa della realizzazione di un sistema per l'inoltro automatico delle notizie, la parola d'ordine è raggiungere nuovi e prestigiosi traguardi, senza dimenticare l'esempio di Giorgio Bronzetti, fondatore della testata.

http://shockdom.com/open/grillo/

Honoron al meritantoj

Renato Corsetti

Loĝas ie en perdita vilaĝo en Norda Italujo esperantista paro. Danke al Esperanto kaj al sia verkista talento ili tamen ne estas perditaj en Esperantujo. Tute male ili estas en la centro de riĉa reto de kunligoj en la tuta Esperantujo. Ili estas verkistoj konataj kaj alte taksataj de Svedujo al Suda Afriko. La plej konata verko de li eble estas:
2006 Sen Rodin "*Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj*" - novelaro - eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, p 360 - mend. ĉe libroservo de IEF
Tamen li ankaŭ multe tradukis. El tiuj tradukoj ni elektu la jenan:
2009 Carmen Cassinis "*Vivovero de virino*" (trad. Filippo Franceschi) eld. Editura Triade, Kluĵo, p.131 - mendebla ĉe UEA-Libroservo
kiu estas, en la konciza priskribo de la libro servo de UEA, membiografio diktita al la filo, kiu poste esperantigis ĝin. Alivorte temas pri la patrino de Filippo kaj ŝia vivo.
Kaj ni venas al la lastatempa verko:
2010 Sen Rodin "*Nu, kaj do?- rakontoj, raportoj, recenzoj, revoj*" eld. EXIT, Kluĵo, p. 159 - mendebla ĉe la libroservo de IEF
Pri ĝi mi ne diros ion, ĉar mi promesis recenzi ĝin, kaj ankoraŭ sukcesis legi nur la unuajn du rakontojn.
Ne malpli produktema estas la edzino de ĉi tiu mirinda itala-rumana paro, Julia Sigmond, kiu akiris al si famon dum sia vivo en Rumanujo. Unu el ŝiaj verkoj estas
2001 Sigmond Julia "*Mi ne estas mona Lisa*" - novelaro eld. Bero, Berkeley, p.66 - mendebla ĉe la libroservo de IEF
kiu aperis antaŭ jardeko kaj estis vaste aĉetita de esperantistoj.
Poste ni devas mencii kolekton de mallongaj pecoj de multaj aŭtoroj, kiuj rakontas, kiam ili estis plej feliĉaj en sia vivo:
2008 Sigmond Julia "*Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo?*" eld. Editura Triade, Kluĵo, p.144 - mendebla ĉe la libroservo de IEF
Ŝi redaktis tre longe la revuon "*Bazaro*". Pro ŝia ekloĝado en Italujo kun Filippo ŝi eldonis la lastan numeron de la revuo pasintan jaron:
2009 "*BAZARO n°50*" (lasta numero de la revuo, redaktis Sigmond J.) eld. Triade, Kluĵo, p.102 - mendebla ĉe J.Sigmond, str. Vlahuta 7/6, 400310 Cluj-Napoca, Rumanio jjjusi@gmail.com
Entute, kiel vi vidas, ni havas kialojn por esti feliĉaj pri la agado de la paro Franceschi-Sigmond, kiu donas brilon al la kulturo de italaj esperantistoj.

Etichette in esperanto

Gianni Conti

Amici dell'esperanto,
Su parecchi prodotti in commercio, a volte troviamo un elenco di traduzioni in diverse lingue, senza naturalmente l'esperanto.
Dobbiamo porre rimedio a questa mancanza e cercare di far mettere pure la traduzione in esperanto (col relativo nostro logo).
Questo è molto importante, perché può diventare un sistema meraviglioso per farci pubblicità gratuitamente.
Abbiamo quindi bisogno dell'aiuto di tutti!
Chi conosce o ha buoni contatti con qualche impresa (anche piccola) che già usa varie traduzioni, ci segnali il nominativo e noi cercheremo di contattarle, offrendo loro gratuitamente il logo e le traduzioni in esperanto dei loro messaggi commerciali.

Contattare:
Gianni Conti
Via F. Filzi,51
20032 Cormano (MI)
givanni.conti@alice.it

OFFERTE FEI

2) NN € 10,00
3) GENTILI Laura € 20,00

La paro Franceschi-Sigmond hejme

RECENZOJ

Poezio kaj historio

Kvazaŭ bilanco de vivo

Carlo Minnaja

La interna subtitolo estas: “Poemoj, kiujn vi konas. Ĉu ne?” Efektive temas pri selekto el la sep poemaroj ĝis nun aperigitaj de la ĉeĥa poetino, nun 87-jara, ek de la unua Nur tri kolorojn ĉe Stafeto en 1960 ĝis Rapide pasas la temp’ ĉe Kava-Pech en 2003. Literaturo kaj ĉefe poezio traarkas ŝian tutan vivon: jam kiel dektrijarulino ŝi verkas; post ne longe sep ŝiajn rakontojn aperigas kun laŭdo ĉeĥa gazeto. Poetino en la ĉeĥa, en Esperanto ŝi trovas sian ĉefan esprimilon: lerninte la lingvon en 1948, ŝi atingas dek du fojojn premiojn pro originala poezio. Profesie instruistino, sed abunde E-instruistino kaj aktivulino. Venkoj, premioj, partoprenoj en literaturaj juĝkomisionoj, akademianeco, honoraj membrecoj punktumas ŝian brilan karieron. Poemoj ŝiaj aperas en pli ol tridek periodaĵoj, kelkaj estas muzikigitaj, tradukojn ŝi atingas en ok lingvoj, inkluzive la italan.

La 130-paĝa libreto prezentas tre rigoran selekton, tial oni povas bedaŭri, ke ne estas pli multaj de ĉi tiu fascina poetino, kiu sin spegulas tiel: Vizaĝ’ de pupo, porcelane pala / do ne aparta; male: tre banala. / Ĝi morta ŝajnus certe se du astroj / (nigraj pupiloj, unu el kontrastoj) / ne brilus larĝe de sub okulbrovoj./ Kio alia? Jen fiaskas provoj / dum la serĉad’ pri ĉarmo speciala. / Vizaĝ’ de pupo, porcelane pala.

Amoro kaj erotiko estas ĉefaj temoj ĉe Urbanová; interna enrigardo (pronomo “mi” oftegas) sen prudo aŭ falsa pudoro malkaŝas al ni virinon plene vervan, ambezonan ankoraŭ en sia maljunaĝo. Ŝi faras bilancon pri sia vivo, sed sen nostalgio, sen bedaŭro: tristoj kaj ĝojoj, amoj kaj seniluziiĝoj, animo kaj korpo. Ŝi trapasis la generacion de Baghy, kies fidela disĉiplo ŝi estis, kaj de Auld; iuj trajtoj similigas ŝin al la frua Boulton. Leganto kiu maltrafis ŝiajn antaŭajn verkojn trovas ĉi tie specimenojn por proksimiĝi al vere intensa personeco.

Eli Urbanova
Prefere ne tro rigardi retro
Dobřihovice 2007
Kava-Pech
127 paĝoj
10.50 €
ISBN 9788085853940

Inter la plej bonaj lastatempaj turismaj libroj

Renato Corsetti

Unu el la flankefikoj de la Universala Kongreso en Florenco estis antaŭ kelkaj jaroj la eldono en Esperanto de gvidlibro tra Florenco bazita sur la itallingva "oficiala" gvidlibro de la itala Turisma Klubo. La Itala Turisma Klubo estas grandega asocio, forme privata, sed enhave publika, kiu favoras turismon en Italujo. Tiu eldono rapide elĉerpiĝis, kaj la senlaca Pier Vittorio Orlandini entreprenis ĝian aktualigon, ampleksigon kaj reeldonon. La nuna, dika, 310-paĝa libro estas io tute alia rilate al la unua eldono. Ĝi enhavas 53 paĝojn da koloraj fotoj pri artaĵoj troveblaj en Florenco, kio en si mem meritas aĉeton. Ĝi riĉiĝis per historia kaj arta parto. La historia parto klarigas pri ĉiuj membroj de la reganta familio Medici (Mediĉoj en la libro) laŭ tempa sinsekvo, tiel ke oni havas aldonan enpenetron en la plej faman periodon de la historio de Florenco, la Renesanco. La arta parto klarigas artajn terminojn, ekzemple kio estas absido. Se vi havas artajn emojn vi certe ĝuos la 12-paĝan liston ĝis "volbo". Ne necesas longe paroli pri la ĉefa parto de la libro, tio estas pri la klarigoj donataj al turisto, kiu vagas tra la monumentoj de Florenco. Aparte plaĉa estas ĝia iom pasinteca stilo: "En Via de' Servi, kiu kruciĝas kun Via degli Alfani, ni povas vidi kelkajn rimarkindajn palacojn: inter ili, je stratnumero 15, palacon Niccolini…". Tamen, malgraŭ la plaĉa stilo ĝi prezentas tre seriozan kaj eĉ pedantan priskribon de ĉio arta en Florenco, ne nur de la ĉefaj vidindaĵoj vizitataj de rapidantaj japanaj turistoj. La listo de la objektoj pritraktataj ampleksas 12 paĝojn kaj enhavas erojn kiel "Muzeo de Historio de Fotografio" aŭ "Turo de la Paljaca", pri kiuj mi neniam aŭdis paroli antaŭ ol legi ĉi tiun libron. Laŭdindas la tradukinto/redaktinto pro enplektado en la originalan tekston de informoj el nuntempaj enciklopedioj kaj aliaj pli specifaj verkoj, tiel ke la verko ne estas nura traduko sed ankaŭ aktualigo. Tamen redaktanto de tia libro renkontas problemon konatan de italaj esperantistoj. Ankaŭ la itala lingvo estas principe fonetika, laŭsone skribita, sed ne tiom kiom Esperanto kaj ĉefe ne pri la akcentoj en la vorto mem, kiuj ne estas indikitaj de la skribo krom se ili estas en la lasta pozicio. Estas alia apartaĵo de la itala, la distingo inter unuobla kaj duobla litero, ekzemple pala/palla elparolataj kiel /pala/ kaj /pal:a/ (= ŝovelilo kaj pilko). Por montri al eksterlandaj esperantistoj la ĝustan elparolon de la italaj nomoj, kiujn ili amase renkontas, oni provas redoni la elparolon per la alfabeto de Esperanto, sed tio ne estas simpla. Tamen la redaktanto de ĉi tiu libro iel devis provi solvi la problemo. Orlandini laŭdinde provis sed la rezulto ne ĉiam estas perfekta. La afero funkcias tre bone, kiam la originala nomo havas la akcenton en la antaŭlasta silabo kiel en Esperanto: Arcetri = Arĉetri. Sed en aliaj okazoj oni devis enkonduki aldonajn supersignojn: Giudici = Ĝùdiĉi. Ne estas certe ke koreaj esperantistoj komprenos pri kio temas. La samajn signojn oni trovas ankaŭ en okazoj, kiam ili ne estas bezonataj: Cento Finestre = Ĉènto Finèstre. Pri la duoblaj literoj Orlandini decidis, ke oni lernu elparoli ilin kiel italoj: Ferrucci = Ferruĉĉi.

Tio, tamen, estas malgranda ofero por legi unu el la plej belaj turismaj libroj, kiun mi renkontis lastatempe.



Pier Vittorio Orlandini
(redaktis)
Florenco
Grosseto 2010
Innocenti
310 paĝoj 21 cm € 10
ISBN 9788889818695

iej nova sento
SPAZIO GIOVANE PER I GIOVANI
http://iej.esperanto.it

Du aferoj estas senfinaj: universo kaj homa stulteco. Pri la unua mi ne certas.
A. Einstein

FESTO 2010

Manuela Ronco

De la 13a ĝis la 20a de aŭgusto, en Donneville, apud Tuluzo, okazis la franca junulara festivalo, nomata FESTO, kaj renoma inter la junaj esperantistoj pro sia mojoseco.
Partopreninte en la karavano kiu alvenis de IJS, mi povis ĝui la festan etoson kaj la francan kuirarton (!) jam du tagojn antaŭe, kaj volonte aliĝis al la teamo de helpantoj bezonata pro la apartaj ĉi-jaraj loĝkondiĉoj. Fakte, la universitata domo - kie devintus okazi la aranĝo - subite rifuzis gastigi ĝin. Tio estis ja problemo, solvita de la organizantoj loĝigante la partoprenantaron en granda kampo, apud la studioj de Vinilkosmo... nu, amuza tendumado: mojose, ĉu ne?
La subĉiela medio certe malfaciligis la mastrumadon de ĉiuj "praktikaj rilatoj". Necesis engaĝi volontulojn por prizorgi la kuiradon, la purigadon, la gardon de la loko, la deĵoron en akceptejo, gufujo, trinkejo, ktp… Mi ŝatis partopreni en la kunlabora etoso, kiu kreiĝis jam de la komenco. Koncerne la dumtagan programon, krom la ekskursoj, ĝenerale ĝi estis ne tro riĉa, kelkfoje improvizita, kaj la homoj kutime pasigis senstreĉe la tempon per babiladoj, klaĉoj, tablo-ludoj, ktp… Male, la vespera programo estis eventoplena: la diverspecaj koncertoj mojosis kaj la partoprenantoj certe ĝuis kantante, dancante kaj frenezante sub la scenejo.
Rimarkinda estas, laŭ mi, la kuntreno de la loka komunumo. Ludis ankaŭ lokaj grupoj, kaj publika koncerto de Kajto okazis en Tuluzo. Ankaŭ la nokto, kompreneble, estis provizita de interesaj programeroj: filmejo, diskejo, gufujo ĉe la fajro… kun tiom da elektoj, kiel oni povus dormi? Fakte, malgraŭ la frosta aero, la noktemuloj neniam mankis, kaj ĉiam sukcesis varmigi la etoson per muziko, kantoj, ludoj, alkoholaĵoj, diskutoj, ridadoj, kaj karesoj…
Necesas multe gratuli la homojn de JEFO, kiuj ne senkuraĝiĝis pro la organizaj malfacilaĵoj, kaj danki ĉiujn kiuj solidare helpis por ke ĉio bone funkciu. Ilia gajeco, sed ankaŭ grandega klopodo kaj engaĝiĝo, igis FESTOn amuza, bonetosa, kaj sukcesa aranĝo. Mi kredas ke per kunlaboro kaj bona volo oni povas atingi mirindajn rezultojn, kaj dum Festo mi ricevis kroman pruvon de tio.

La sidejo de FESTO 2010


Vizito de Tuluzo, gvidata de JoMo dum Festo

EsperanTago en Torino

Gianfranca Gastaldi

Torino, 13 giugno 2010: l'Imbarchino, famoso locale in riva al Po, vede sedersi al tavolo una decina di persone. Diverse tra di loro, tutte accomunate però dalla lingua: non l'italiano, bensì l'esperanto.
Si è svolta infatti all'inizio della scorsa estate l'EsperanTago, consueto appuntamento dei giovani esperantisti, che è nato con lo scopo di condividere una giornata all'insegna dell'esperanto e, al tempo stesso, di sensibilizzare il pubblico locale a questa lingua.
Quest'anno la IEJ ha deciso di realizzare la giornata nel centro di Torino, alternando momenti di svago ad altri di formazione: il tutto nella bella cornice del parco cittadino più conosciuto, il Valentino. I giovani esperantisti sono così stati subito presi per la gola, con un inizio di giornata che si è svolto al Caffè Lumière, storica torteria alle spalle della stazione di Porta Nuova. Si è poi proseguito alla volta del Parco attraversando il quartiere di San Salvario, zona del centro storico conosciuta per la sua multiculturalità. Arrivati al Valentino, attendeva gli esperantisti un lauto pranzo a base di cous cous e focacce, in una cornice stupenda: in riva al Po, all'Imbarchino. E' durante il pomeriggio che l'EsperanTago è entrata nel vivo: con la "Caccia all'Esperantista" la cittadinanza (che, inconsapevole, contava di trascorrere una tranquilla domenica pomeriggio) è stata coinvolta in un gioco a squadre interamente svolto in esperanto. Scioglilingua, proverbi, etimo delle parole: gli ignari astanti sono stati invitati a conoscere un po' più da vicino questa lingua, a entrare nel vivo delle sue parole, a conoscere le persone che la parlano.
Un bilancio positivo, quindi, per l'EsperanTago 2010: oltre ai giovani dei principali gruppi della zona sono state coinvolte infatti anche persone alla loro prima esperienza esperantista.
Sicuramente, un'esperienza da ripetere, ampliando sempre più il confronto con la cittadinanza locale.

Lignano, opinioj de novulo

Claudio Dorighet

Mi vidis la interretan anoncon pri la Itala Kongreso nur du tagoj antaŭ la komenco, kaj mi decidis aliĝi (eĉ se tio ŝainis al mi frenezaĵo, ĉar mi nur komencis lerni Esperanton en julio). Sed fakte nun mi multe ĝojas pro mia decido, ĉar la semajno estis mirinda kaj mi povis praktiki la lingvon kaj renkonti multe da simpatiaj esperantistoj el malsamaj landoj.
Tage mi partoprenis belegan esperantan kurson kun la Cseh-instruistino Gražina Opulskienė. Ŝiaj lecionoj estis tre instruaj kaj interesaj, ĉar ŝi proponis al ni ankaŭ ludojn, kantojn kaj amuzajn ekzercojn. Ĉiuj la partoprenantoj estis entuziasmaj. Dankegon, Gražina!
Ankaŭ nokte la etoso estis tre gaja, kaj oni povis amuziĝi per la riĉa programo aranĝita de la Itala Junularo: koncertoj, teatraĵoj, ludoj kaj eĉ gastronomiaj gustumadoj!
Mi kore dankas Fabio Bettani, Bruĉio Kasini kaj Laŭra Brazzabeni, kiuj helpis min aliĝi kaj trovi loĝejon!
Mi estas tre kontenta ke mi povis ĉeesti en Linjano, kaj nun mi atendas senpacience la venontajn kongresojn!

NOVA SENTO a cura della IEJ

Redattore

Manuela Ronco
corso Asti 151,
12043 Canale (CN)
Tel.3281070922
manuchan@interfree.it

Conto Corrente Bancario
Federazione Esperantista Italiana - Sezione Giovani
IBAN:
IT84T0306234210000000932107

Triesta Esperanto-Asocio

lanĉas
la 4an Internacian Konkurson - jaro 2010
pri la temo:

Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **15a de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: "kiel mi imagas tiun tradician feston", "la Kristnaska Kripo", "familia festo");

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al Kat. 2) aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La "rakonto" aŭ "poeziaĵo" estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:
* persona kaj familia nomoj;
* aĝo;
* lernejo kaj klaso;
* poŝta adreso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtoro.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.it

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA - Libri

Mi ne estas mona Lisa.
Júlia Sigmond.
Dek kvin facile legeblaj kaj ĝuindaj rakontoj, ofte pri mem spertitaj okazaĵoj kaj renkontiĝoj.
Eld: Bero. Berkeley. 2001. 21 cm, 64 p.
Prezo: 6.00 €



Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj
Sen Rodin
Novelaro pri la spertoj de juna sudlandano en Norda Lando, plus aliaj allogaj noveloj.
F.E.L., Antwerpen 2006, 21 cm, 360 p.
Prezo € 26,00



Nu, kaj do? Rakontoj, raportoj, recenzoj.
Sen Rodin
Kolekto de rakontoj kaj recencoj parte originale verkitaj kaj parte jam publikigitaj en diversaj revuoj.
Exit. Cluj-Napoca, Rumanio, 2010. 21 cm, 159 p.

Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo?
Sigmond Julia
Kolekto de kontribuaĵoj al la samtitola rubriko de la esperanta bulteno "Bazaro" eld. Editura Triade, Cluj-Napoca, Rumanio, 2008. 21 cm , 144 p.
Prezo: 9.90 €

Per ordini:
FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA - Libri
via Villoresi, 38 - 20143 Milano
Tel. 02.58100857 - Posta El. : fei@esperanto.it
C/C n. n.54614524 - IBAN: IT11K0760101600000054614524